

Eduard Ebel,  
 Ŝvebas neĝ el aer'  
*tradukita de Joachim Gießner*

Švebas neĝ' el aer',  
 nun ripozas la ter'.  
 Mondo en brilblanka vest',  
 ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',  
 for ĉagreno kaj plor',  
 ĉesas de l' viv' la molest',  
 ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.  
 Kaj el ĉielo la ĥor  
 Sonos en dolĉa majest',  
 Goju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*MR-012-JG-1 / Arg-99-200 (2012-12-24 16:27:56)*

*MR-012-JG-1*

Eduard Ebel,  
 Flustre falas la neĝ'  
*tradukita de Josef Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.  
 Lag' rigidas laŭ leg'.  
 Kristfeste brilas arbar'.  
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.  
 Foras ĉiu dolor'.  
 Fugas la vivoamar'.  
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'  
 kaj ĉielo jubil'  
 logas laŭ ĉarma fanfar':  
 Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

*MR-012-JK-1 / Arg-99-202 (2010-09-18 19:50:56)*

*MR-012-JK1*